


# CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO  
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 121**

***N-RO 21 (89), OKTOBRO 2021***

# Enhavo

## *Originala poezio*

<i>Valentin Melnikov</i>	
Nokta gasto	3
<i>Mikaelo Bronŝtejn</i>	
15 poemoj de la somero kaj aŭtuno	4
<i>Eŭgeno Georgiev (Espopore)</i>	
Maloj, Tri papilioj	10
<i>Klara Ilutoviĉ</i>	
Esperu Esperanton, Ĉu venko aŭ partopreno?	13

## **Datrevenoj de la rusa kulturo**

<b>Fjodor Dostojevskij. 200 jaroj post la naskiĝo – 140 jaroj post la morto</b>	<b>14</b>
<b>Igor Severjanin. Dostojevskij. Trad. de K. Ilutoviĉ</b>	<b>15</b>

## *Tradukita poezio*

<i>Gennadij Ŝpalikov.</i>	
“Por malbeno aŭ por beno”. Trad. <i>Ju. Finkel</i>	16
<i>Bulat Okuĝava.</i>	
Kartvela kanto. Trad. <i>A. Junusov.</i>	17

## *Tradukita prozo*

<i>Vsevolod Garŝin. Tre kurta romano. Trad. G. Ŝlepĉenko</i>	18
<i>Tradukoj el Esperanto al la rusa</i>	
<i>Oleg Ĉajka. “Blua nebulo arbaron brakligas”. Rusigis A. Aliverdiev kaj Lubov Ostrevnaja.</i>	22

## *Libroj*

<i>S. Smetanina. La unua porinfana lernolibro reeldonita</i>	23
<i>N. Gudskov. Ludmila Ulickaja en Esperanto.</i>	23

## *Por distro kaj amuzo*

<b>Krucvortemigmo. Kompilis M. Povorin</b>	25
--	----

## *Humuro*

<i>Nikolao Neĉaev. Nigra kvadrato</i>	26
<b>Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 2021</b>	<b>27</b>
<b>Alvoko al partopreno en la 73-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA, en 2022</b>	<b>29</b>

## Originala poezio

Valentin Melnikov

### Nokta gasto

*soneto<sup>1</sup>*



Mi perdis kapon, ekvidinte vin.  
Al vi min logis stranga fort' magia.  
Kaj jen al vi mi venis, amikin',  
Duopas ni – por proksimiĝo plia.

Ni trinkas teon – ne necesas vin'.  
Kirliĝas sentoj... Pro cedemo via,  
Rigard' karesa, ravo kaj fascin'  
Ne iĝas mi kuraĝa. Nur – ebria.

En via hejmo invitita gast',  
Kunecon nian ĝuas mi sen hast'.  
Komfort'... langvor'... do povas ni feliĉi.

Malfrua hor'. Fermitas la kurten'.  
En via hejm' mi restus ĝis maten',  
Sed tempas jam foriri... kaj vekigi.



---

<sup>1</sup> Premiita kiel la plej bona soneto en la 6-a konkurso "Poesia da tutti i cieli / Poezio el ĉiuj ĉieloj", 2020-2021.



## *Mikaelo Bronŝtejn*

\*\*\*

Verdaflage maskita  
sidas mi en vagono.  
Certe, servas la masko  
por la sano kaj bono.  
Sed krom tio ĝi kreas  
certan tiklan problemon,  
provokante najbaran  
miron kaj scivolemon.

22.05.21

\*\*\*

Vespere mi evitas ŝalti televidon,  
kun taĝxurnalo mi evitas ekmateni.  
Najbaroj diras: "Jen strangul'!", kaŝante ridon, -  
konversaciojn ja ne povas mi subteni.  
Ne gravas tamen la najbara opinio,  
mi daŭre agu spite al klaĉado moka,  
kaj restu pace mi en karapaco mia  
por min protekti kontraŭ spiro mezepoka.

02.06.21

### **Naskiĝtago de Puŝkin**

Jes, mi ŝatas poemojn de Puŝkin,  
Levu manon, kiu ne ŝatas! –  
Mi ne celas forpeli, forpuŝi,  
Nur ekscii, kiom rilatas  
Tempoiro - pli ol du jarcentoj! -  
Kun kompren' pri aferoj tiamaj,  
Kiom da realaj elcentoj  
Konas lin, krom la verkoj amaj,  
Kiel nun enplektiĝas la temoj,  
Kiujn studis li praepoke,  
En trikajon de la problemoj,  
Turmentantaj nin, nialoke,  
Kiam do, en kiu estonto  
La homar' povos vivi sen li,  
Ĉu scipovos do, ekster honto,  
Lia vorto vendojn akceli,  
Mensogeti, flataĉi, fuŝi,  
Glori ion, kion mi hatas...  
Jes, mi ŝatas poemojn de Puŝkin.  
Levu manon, kiu ne ŝatas.



06.06.21

\*\*\*

La floroj sunkoloraj  
disfloris senatende,  
la floroj sunkoloraj  
aperis en maten' de  
ĝojiga semajnfino.  
Mi ĝuas dum ripoz' do  
l'odoron, sed la vinon  
mi ĝuos iom poste  
por perfektigi sciojn  
pri l' gust' de portovino  
kaj por ekami ĉiujn  
ĝis fin' de l'semajnfino.



11.06.21

\*\*\*

Aromo dolĉa de l' unua peonio  
allogas ne nur min, sed ankaŭ muŝojn.  
La peonio kvazaŭ ŝatas ties tuŝojn.  
Mi spektas tion. Jes, banalas opinio,  
ke belulinoj dolĉaj, certe, agas same,  
logante virojn por neforgesebla kuno,  
kaj ke la viroj, kiel muŝoj stultas ame...  
Sed kien fuĝis vi, ho mia dolĉa junco?



14.06.21

\*\*\*

Ĉe miaj kukumoj umanta,  
por pli ĝusta dir' kukumanta,  
mi kaŝas min nun de la ardo  
sunega dum flama tagar', do  
iama printempa aktivo –  
nun verda ŝildeg' por la vivo.  
13.07.21



\*\*\*

Mia mond', ne senriproĉa  
sed ja senalternativa,  
fervorigas min eĉ tro, ĉar  
mi, bonŝance, restas viva.

Suno ardas inkandeske,  
ĉie la virus' furoras,  
mi... mi diru nun kun dec' ke  
mi laboras, mi adoras  
miajn fruktojn enĝardene,  
la naturon ĉirkaŭantan,  
versojn, kiuj venas bene  
en animon mian vant,

kaj al la destin' favora  
pretas doni ajnan pagon  
por ke faru ŝi labora  
ĉiun mian ontan tagon.

28.07.21

\*\*\*

Ne multas floretoj en mia ĝarden'  
pro l'into sunarda,  
nur kelkaj sukcesis ĝojigi min sen  
orgojlo standarda,  
modeste kaj milde florantaj de nun  
sur grundo avara...  
Sed ĝuas restadon ĉi tie mi kun  
floreto' la plej kara.

07.08.21



\*\*\*


En la societ'  
paca kaj senbrua  
vero ambigua  
dominetis, sed  
tiu ĝena pek'  
estis ne problemo,  
ĉar forestis emo  
iam diri "Ek!"  
Do forrajdis ver'  
vera surĉevale,  
ĉar ja tutegale  
mankis la esper'  
veni al favor'  
en la societo,  
preta al hebeto...  
Ĉu ni rajdu for?

11.08.21

\*\*\*

Asertas multaj: – Pasis jam delonge  
la modo parnaseca pri l'rimad'.  
Rimado stulta puŝas nin deloge  
al rebaseca, senkomprena pad'!  
Respondu mi: - La modo nun foiras  
per ĉiu ajn senrima sentesprim'.  
Ho ŝi, ventkaraktera, ja foriras,  
sed restas ĉarmo de poem' kun rim'.  
Senrime verki – komplikega tasko,  
ne multaj ja sukcesas fari, ke  
l'poemo ekefiku sen fiasko  
ne kiel ordinara proza kern'.  
Rimad' neniam estis la ĉefcelo  
de belaj kaj sinceraj versoj, sed  
neniam eksmodiĝas versa belo,  
kaj estas ja defio por poet'  
enmeti pensojn saĝajn, eĉ geniajn,  
en kadron de fascina rimpoem',  
kunplekti diskutindajn opiniojn  
en kron', pri kiu li kontentus mem.  
Do ne koleru kontraŭ mi, kolegoj,  
plu verku aŭ rilaksu en ripoz',  
sed prozpoemoj, foje eĉ belegaj,  
plejparte restas prozo. Nura proz'.

16.08.21



\*\*\*

Rufulinjo-aŭtuno alvenas kun pluvoj kaj floroj,  
revokante en mi melodiojn de amo kaj juno,  
reverokante en mi la poemon pri cent mil koloroj,  
kiujn doni scipovas nur neforgesebla aŭtuno.  
La animo sin banas en tiu kolora abundo,  
el la korpo maljuna al ravaj odoroj aspiras,  
kaj aspektas feliĉa nun ĉiu pasinta sekundo,  
kaj la vivo bonŝance plu iras, kaj iras, kaj iras...

20.08.21



\*\*\*

Por la vila mondo kata  
regas leĝoj senkontestaj:  
ĉiam estas alvokata  
helpo de l' ŝatataj bestoj.  
Se vi serĉas, sed ne trovas  
varon en la katalogo,  
vin pacigi, certe, povas  
Milda vila kata logo.  
Se vi volas gajan ludon,  
tamen mankas kunludanto, -  
voku katon en apudon,  
partoprenos ĝi kun vanto.  
Se ofendo aŭ ĉagreno  
vin turmentas antaŭ dormo,  
kreditu min ke kata veno  
trankviligos vin ĝis normo.  
Molan felon do karesu,  
pace ĝuu la ronronon,  
kaj akiri ne forgesu,  
por la kat' frandaĵon bonan.  
25.08.21



\*\*\*

Mia poma mondo kutime abundas autune,  
provizante dolĉan aromon, acideton, acerbon.  
Estas vera plezuro eĉ spekti la bildon, ĉu ne,  
se la branĉoj plenas, kaj pomoj falas en herbon.  
Estas vera plezuro – kliniĝi kaj preni, movi  
belan frukton frandindan al la avida buŝo.  
Se hazarde iu-ajn Eva apudus, do vi  
pelus for la Serponton, sed ŝin karesus per tuŝo...  
Ĝojas mia animo klara pro ĉiu maĉata peco,  
logas flugi anasoj, are flugantaj en foro ĉiela,  
revas do pri Eva mi nun kun inda maldeco –  
mankas ŝi por kompleta ĝu' en ĉi-mondo hela.  
31.08.21





\*\*\*

Mi estas Kato! Mi fieras  
pro mia nobla kat-deven',  
mi vivas sate, mi liberas  
kun tiu ĉi fortuna ben'.  
Kaj ekster politik' en tuto  
restadu mi, prudenta Kat',  
indiferenta al disputo  
inter dekstrul' kaj demokrat'.  
Sed mia mastro voĉon vendas  
dum balotado sen skrupul',  
kvazaŭ de lia voĉ' dependas  
ĉu regos dupo, ĉu stultul'.  
Se devus nun mi mem voĉdoni,  
kuraĝe miaŭs mi al oni:  
- Mi estas kat' de pura raso,  
sed kiu estas vi, fatraso?!

06.09.21



\*\*\*

Boletoj ruĝaj, boletoj noblaj  
en ombro kreskas dum varmaj noktoj,  
sekrete, mute, sen min informi,  
do la serĉado fascinas por mi,  
kaj mi triumfas, ion trovinte,  
kun ĝojkrieto. Paŝado inter  
tremoloj, pinoj, abioj tentas  
profunde spiri, mi nur atentas  
makulon rufan, makulon brunan,  
kaj radietoj de l'milda sun' en  
la kronojn falas, kaj el embusko  
lepore saltas al densa musko.  
Sed ne kaŝante sin en profundo,  
provokas preni pompa muŝfungo,  
amiko falsa belegas vane –  
ĝin mi evitos tuŝi permane.

08.09.21



## *Evgenij Georgiev (Espopore), Kazahio*

### **Maloj**



Duone pulvo, duone polvo,  
Duone maro, duone muro...  
Denove softas la darka blovo,  
Danke al blanko en la murmuro.

Denove vento incitas branĉojn,  
Daŭrigas vojon vagantaj nuboj.  
Di' prenas ree naturan arĉon,  
Diablo donas aldon inkuban.

Damnante, benas; pentante, sakras  
Dormo totala ĉe la polusoj.  
Duras molaĵo, minutoj akras  
Dum la minusoj fariĝas plusoj.

Dampas la pluvon imagopovo,  
Drese konstruas eburan turon  
Duone pulvo, duone polvo,  
Duone maro, duone muro...

### **Tri papilioj**

*(Laŭ la persa sentenco)*

Tri papilioj flirtis ĉe kandel',  
Per la venena suk' – nektaro de l'  
Amara nokt' – enuon forpelante,  
Kaj per konversacia bagatel'.

L' unua diris: "Sentas mi en flam'  
Nebulon nuran de l' ĉiama fam',  
Sed kio estas tiu ruĝa floro  
Mi tute timas eĉ imagi jam..."

Ekflugis ĝi por propra okulum'  
Al fajr' enigma ĉe muŝetkolumn'  
Kaj, dispuŝinte l' muŝojn, ensorĉiĝis;  
Post la reven' balbutis pri la lum' .

Ne kredis la kunuloj al rakont',  
Aliaj cirkonstancoj de l' renkont'  
Kun lum' superba devis klare flagri,  
Sed eble flamis hont' post feka mont' .

Tiam impetis l' dua papili'  
Al ard' angora por ekkoni pli.

"Ĝi ja brulvundas! Ve al la flugilo!" –  
Proklamis laŭte la pasia kri'.

Konata voĉ'! Sed frapis nova pens',  
Simple demandas de la dubo dens':  
"Kiel entute povas floro vundi?  
Ĉu ĝin ne trompas petolema mens'?"

La tria ĉion solvi volis tre  
Severe ĝin cindrigis la pere':  
Kaj la povrulon fajro plene voris,  
Cetere kun rebrilo de ĉagren'.

Vantaĵo de vantaĵoj kaj geni'  
Ne samsignifas en okul' de ni,  
Ĉar kiu konas, tiu silentadas,  
Kaj venta vort' valoras je neni'...





## **Esperu Esperanton!**

La aĝo obstine rezistas  
Vigliĝi por iu konker',  
Sed se Esperanton ni uzas,  
Ĉu vivu pri bono esper'?"

La voĉo kulpiga alfluas  
Atake de iu demon',  
Sed se Esperanton mi ĝuas,  
Do, eble, por mia pardon?

La sombra humor' preme ronĝas  
Doloras la viv' ĉiam pli,  
Sed se Esperanton mi sonĝas  
Ĉu ĝi plu amikos kun mi?

La vivo timigas kaj ŝokas  
Per nova kaj nova malben',  
Sed se Esperanton mi vokas,  
Ĉu lasos ĝi min sen subten'?"

En forta venkem' kaj rezisto  
Al ajna malhela movad'  
Esperu, do, esperantisto  
Esperanton por ĝia helpad'!

Majo 2021



# Ĉu venko aŭ partopreno?

*Ni kredas forte  
Je agloj sportaj,  
Por ni venk' estu, kiel aer',  
Volas ni, ke rekordoj  
Niajn nomojn ricevu sur Ter'!<sup>2</sup>  
N. Dobronravov*

Oni konkuras en la Olimpikoj,  
Venko, admire, honoro.  
Fortaj rivaloj – sed ne malamikoj!  
Falo, postresta doloro.


Do, pli rapide, pli alten, pli forte  
Kaj ankaŭ kune en jaro,  
Kiam kovim' regas, plu malbonsorte.  
Regu venkem' antaŭ baro!

Ĉiu penadas sin pruvi plej bona,  
Ĉiu al venko aspiras  
En la etoso multflanke impona,  
Kiu nur venkon deziras.

Montru al vi kaj al via trejnado  
Vian senduban valoron,  
Dum apudulo – ne plu kamarado –  
Arde pretendas venk-oron.

Partoprenantoj pri l' venko esperas  
En l' Olimpikoj estonte,  
Kaj ĉampionoj plu novaj aperas,  
Novaj venkintoj tutmonde.

Pri l' Olimpikoj cirkulas kompreno,  
Trankviliganra sincere:  
Gravas ne venko, sed la partopreno!  
Tamen – ĉu vere?




---

<sup>2</sup> Refreno de la kanto laŭ muziko de A. Paĥmutova “Al herojoj de sporto”.

## Datrevenoj de la rusa kulturo

### Fjodor Dostojevskij.

200 jaroj post la naskiĝo – 140 jaroj post la morto



#### Fjodor Miĥajloviĉ DOSTOJEVSKIJ

(naskiĝis la 11-an de novembro 1821 en Moskvo; mortis la 9-an de februaro 1881 en Sankt-Peterburgo) estis rusa romanisto, novelisto, eseisto kaj ĵurnalisto. Li estas konsiderata unu el la plej grandaj romanverkistoj en la historio pro profunda psikologio de la protagonistoj. La verkoj de Dostojevskij esploras homan psikologion en la politikaj, sociaj, kaj spiritaj kondiĉoj de Rusio en la 2-a duono de la 19-a jc. kaj estas konsiderata ankaŭ kiel filozofo pri religiaj temoj, kvankam


lia mondkoncepto ŝanĝiĝis dum la vivo ekde simpatico al radikalaj revoluciuloj (pro kiu li pasigis 9 jarojn en bagno kaj ekzilo) ĝis reakcia “grundismo” fine de la vivo. El ĉiuj rusaj verkistoj li estas plej konata eksterlande (apud Lev Tolstoj).

Verkoj de FJodor Dostojevskij estas tradukitaj al dekoj da lingvoj, i.a. al Esperanto. Fruaj tradukoj de liaj verkoj (i.a. traduko de la grandega romano “Fratoj Karamazov” far Ivan Ŝirjaev) estas aŭ malnoviĝintaj, aŭ perditaj. Ekde 1993 la eldonejo “Sezonoj” komencis eldoni novajn tradukojn de liaj verkoj, komencinte de la romano “Krimo kaj puno” (trad. An. Parfentjev). En 2002 estis eldonita volume “Blankaj noktoj” kun romano “Malriĉaj homoj” kaj kvin noveloj (“Sozio”, “Blankaj noktoj”, “Honesta ŝtelisto”, “Misfortuna historio”, “Noticoj el la kelo”, kiujn tradukis G. Arosev, A. Birjulin, A. Korĵenkov), kiun devis sekvi ankoraŭ 5 volumoj de kolektitaj verkoj, sed la projekto, bedaŭrinde, rezultiĝis finance tre malprofita, kaj ne efektiviĝis.

Ĉi tie ni honorigas lian memoron per poemo de rusa “poeto-futuriso Igor Severjanin (1887-1941).

**Достоевский**  
*Игорь Северянин*

Его улыбка — где он взял ее? —  
Согрела всех мучительно-  
влюбленных,  
Униженных, больных и  
оскорбленных,  
Кошмарное земное бытие.  
Угармонированное свое  
В падучей сердце — радость  
обреченных,  
Истерзанных и духом  
исступленных —  
В целебное он превратил питье.  
Все мукой опрокинутые лица,  
Все руки, принужденные сложиться  
В крест на груди, все чтущие закон,  
Единый для живущих —  
Состраданье,  
Все, чрез кого познали оправданье,  
И — человек почти обожествлен.



**Dostojevskij**  
*Igor Severjanin*

Lia ridet' – li kie prenis ĝin?  
Varmigis ĉiujn en la amturmento,  
Malsano, humiliĝ', ofendosento,  
Koŝmaran vivon laŭ la templini'.  
Malsane l' koron por novharmoni'  
Al ĝoj' dum la kondamnoelokvento,  
Premforda viv' kaj malespertorento,  
Li faris la kuraca trinkmagi'.  
Ĉiu vizaĝ', per dramoj faligita,  
Kaj ĉiu mon' dum far' la senevita  
De kruc' sur brusto, ĉiu hom' en leg',  
Por ĉiuj same, korfavormerito –  
Per tiu ĉiu iĝis pravigito,  
Kaj – hom' jam ŝajnas preskaŭ dio-  
reĝ'.

*Trad. Klara Ilutoviĉ*





*Геннадий Шпаликов*

По несчастью или к счастью,  
Истина проста:  
Никогда не возвращайся  
В прежние места.  
Даже если пепелище  
Выглядит вполне,  
Не найти того, что ищем,  
Ни тебе, ни мне.  
Путешествие в обратно  
Я бы запретил,  
Я прошу тебя, как брата,  
Душу не мути.  
А не то рвану по следу —  
Кто меня вернёт? —  
И на валенках уеду  
В сорок пятый год.  
В сорок пятом угадаю,  
Там, где — боже мой! —  
Будет мама молодая  
И отец живой.


*Gennadij Špalikov*  
(1937-1974)

Por malbena aŭ por beno  
Simpla estas ver':  
Vi neniam ajn revenu  
Al gepatra ter'.  
Eĉ se decas la ruino,  
Tamen ambaŭ ni  
Ne retrovos tie, kion  
Serĉas en mani'.  
Al reveno pro kompato  
Ne instigu min,  
Kaj ne ŝiru, mia frato,  
Vundon de l' anim'.  
Ja mi fuĝos laŭ la spuro  
Sen revena fin',  
Sur feltbotoj forveturos  
L' jaron kvardek kvin.  
Tiam trovos mi sub suno  
Kie — ho Jesu! —  
Estos panjo tute juna,  
Patro vivas plu.

*Tradukis Jurij Finkel (Uljanovsko)*







**Булат Окуджава** *Bulat Okuĝava (1924-1997)*

**Грузинская песня**

Виноградную косточку в тёплую  
землю зарою,  
И лозу поцелую, и спелые гроздья  
сорву,  
И друзей созову, на любовь своё  
сердце настрою.  
А иначе, зачем на земле этой вечной  
живу.

Собирайтесь-ка, гости мои, на моё  
угощенье,  
Говорите мне прямо в лицо, кем  
перед вами слыву.  
Царь небесный пошлёт мне  
прощение за прегрешенья.  
А иначе, зачем на земле этой вечной  
живу.

В тёмно-красном своём будет петь  
для меня моя дали,  
В чёрно-белом своём преклоню  
перед нею главу,  
И заслушаюсь я, и умру от любви и  
печали.  
А иначе, зачем на земле этой вечной  
живу.

И когда заклубится закат, по углам  
залетая,  
Пусть опять и опять предо мной  
проплывут наяву  
Белый буйвол, и синий орел, и  
форель золотая.  
А иначе, зачем на земле этой вечной  
живу.

**Kartvela kanto**

Mi la kernon vinberan fosos en varman  
terenon,  
Kaj la viton mi kisos, deŝiros grapolojn  
de ĝi,  
Kaj alvokos amikojn, agordos la koron  
je amo,  
Kaj se ne – do por kio sur ter’ vivas  
mi?

Kolektiĝu, la gastoj, jen estas mia  
regalo,  
Kaj rakontu sincere, kian famon mi  
havas ĉe vi,  
Reĝ’ ĉiela pardonos al mi miajn  
pekojn,  
Kaj se ne – do por kio sur ter’ vivas  
mi?

En ruĝ-vesto kantos por mi mia Dali,  
En griz-vesto mi klinos la kapon antaŭ  
ŝi,  
Kaj aŭskultos mi ŝin, kaj mortos pro  
amo kaj tristo,  
Kaj se ne - do por kio sur ter’ vivas mi?

Kiam la sunsubiro lumigos ĉiujn  
angulojn,  
Jen denove navigos en la real’ antaŭ  
mi,  
Blua aglo, blanka bubalo kaj ora truto  
Kaj se ne – do por kio sur ter’ vivas  
mi?

*Trad. Abdurahman Junusov  
(Maĥaĉkalao)*



## Tradukita prozo

### Vsevolod Garšin

Vsevolod Mihajlovič Garšin (1855 – 1888) estas rusa verkisto, poeto, literatura kritikisto. Li naskiĝis en hereda bieno Plezura Valo de Jekaterinoslava gubernio (nun Ukrainio, Donecka provinco), en nobela familio. Post fino de gimnazio en 1874 li iĝis studento de Sankt-Peterburga instituto de minejoj, sed li ne sukcesis diplomiĝi. En 1877 Rusio komencis militon kontraŭ Turkio, kaj li kiel volontulo direktis sin al fronto. Dum militbatalo li estis vundita, kaj ne povis plu

militservi. Kiel suboficiro li ekŝiĝis, kaj komencis okupiĝi pri literatura agado. Liaj unuaj rakontoj estis dediĉitaj al milita temo. Literatura kreado de Garšin karakteriziĝas per jenaj trajtoj: simpleco, lakoneco, manko de metaforoj kaj komparoj. Liaj plej famaj verkoj estas "Ruĝa floro", "Pentristoj", "Nadeĵda Nikolaevna". Garšin verkis rakontojn ankaŭ por infanoj: "Rano-vojaĝanto", "Tio, kio ne okazis", "Sagao pri fiero Aggeo". En komenco de 80-aj jaroj akutiĝis mensmalsano de la verkisto, kiu alkondukis al tragedio: 33 jaraĝa verkisto suicidis. Li estis entombigita en muzeo-nekropolo en Sankt-Peterburgo.

## Tre kurta romano

Frosto, frido... Surstrate januaro atestas pri si al ĉiuj malriĉuloj, stratbalaistoj, policanoj – al ĉiuj, kiuj ne povas kaŝi sian nazon en varma loko. Ĝi atestas pri si, certe, ankaŭ al mi, ne pro tio, ke mi ne sukcesis trovi por mi varman ejon, sed pro mia propra fantazio.

Efektive, por kio mi vagadas laŭ senhoma kajo? Strataj gaslanternoj hele lumas, kvankam vento trablovas tiujn, kaj devigas danci gasan flamon. Pro ilia hela lumo ombraj partoj de fasado de luksaj palacetoj, precipe fenestroj, ŝajnas ankoraŭ pli mornaj. En grandaj spegulvitroj reflektiĝas neĝvento kaj nokta mallumo. Hurlas, ĝemas vento super glacia dezerto de Nevo. "Ging-gang! Ging-gang!" – tra ventokirilo aŭdiĝas sonorilado: tio sonoras turhorloĝo de citadela ĉeftemplo. Ĉiu bato de la melankolia sonorilo koincidas kun frapado de mia ligna kruro kontraŭ glacikovritaj granitaj platoj, kaj kun frapoj de mia malsana koro.

Mi prezentu min al legantoj. Mi estas junulo kun ligna kruro. Verŝajne vi diros, ke mi imitas Dickens-on; ĉu vi memoras: Sajlas Beg, literatura heroo kun ligna kruro (en romano *"Our common friend"* ["Nia komuna amiko"(angl.)])? Ne, mi ne imitas: mi reale estas junulo sur ligna kruro. Nur mi fariĝis tia antaŭnelonge...

"Ging...gang... giling...gilang!" La turhorloĝo sonbatas komence sian melankolian "Dio indulgu min", kaj poste – unuan horon. Nur estas la unua! Ankoraŭ – sep horoj ĝis tagiĝo! Nur tiam nigra nokto, plena da malseka neĝo, foriros kaj liberigos lokon por griza tago. Ĉu mi iros hejmen? Mi ne scias. Por mi estas tutegale. Mi ne bezonas dormon.

Printempe mi ankaŭ ŝatis vagadi tutan nokton laŭ la kajo. Ho, kiaj estis la noktoj! Kio ekzistas pli bela ol tiuj! Tio ne estas sufoka suda nokto, kun ĝia stranga nigra ĉielo kaj grandaj steloj, kiuj postkuras nin per siaj rigardoj. Ĉi tie ĉio helas kaj feste aspektas. Diverskolora ĉielo estas malvarma kaj bela. Laŭ eklezia kalendaro "aŭroro dum la tuta nokto" origas nordon kaj orienton. Aero estas freŝa kaj akra. Nevo fluas fiera kaj hela, kaj kviete plaŭdas per ondetoj kontraŭ ŝtonoj de la kajo. Sur la kajo staras mi, kaj kontraŭ mia brako apogas sin junulino. Nome tiu junulino...

Oh, estimataj gesinjoroj! Por kio mi komencis rakonti al vi pri miaj korvundoj? Nu, jen estas tia stulta homa koro. Kiam ĝi estas vundita, tiu ĵetadas sin ĉiufanken renkonte al ĉiu nekonata persono, kaj serĉas kvietigon. Sed ĝi ne sukcesas trovi tion. Estas kompreneble, al kiu necesas trua, nefadenflikcita ŝtrumpo? Ĉiu homo penas flankenĵeti ĝin per piedpinto kiel eble foren de sia kruro...

Mia koro ankoraŭ ne bezonis fadenflikسادon, kiam mi ĉi-jare printempe konatiĝis kun Maŝa, kiu, verŝajne, estas la plej bela inter junulinoj kun nomo Maŝa en la mondo. Ni konatiĝis sur la kajo, kiu tiam tute ne estis malvarma kiel nun. Tiutempe mi havis naturan kruron anstataŭ fia ligna protezo, la veran sveltan kruron, kiu similis al la restinta liva. Mi havis sufiĉe sveltan bonstatan figuron, kaj, certe, ne similis kiel nun al ia fia kriplulo. Malbona vorto, sed nun temas ne pri ĝi... Do, mi konatiĝis kun ŝi. Tio okazis tre simple. Mi iris, ŝi iris (mi tute ne estas amindumanto, pli ĝuste ne estis amindumanto, ĉar nun mi havas protezon)... Mi ne scias, kio provokis min, sed mi ekparolis. Antaŭ ĉio, certe, mi diris al ŝi, ke mi tute ne apartenas al arogantuloj k.t.p., kaj mi havas purajn intencojn, k.c. Mia bonanima vizaĝo ( sur kiu nun troviĝas dika haŭtfaldo super nazradiko, tre morna haŭtfaldo) kvietigis la junulinon. Mi akompanis ŝin ĝis strato Galernaja, ĝis ŝia domo mem, kie ŝi loĝis. Ŝi revenis de sia olda avino, kiu loĝis apud ĝardeno Letnij. La junulino ĉiuvespere vizitis ŝin por laŭtlegi romanojn. La kompatinda avino estis blinda!

Nun la avino estas mortinta. Ĉi-jare mortis ankaŭ multaj neoldaj avinoj. Certe, ankaŭ mi havis grandan ŝancon morti. Sed mi eltenis ĉion. Sinjoroj, kiom da suferojn povas elteni la homo? Ĉu vi scias? Ankaŭ mi ne scias.

Tre bone. Maŝa ordonis al mi esti heroo, kaj por tio mi fariĝu armeano.

Tempo de krucmilitoj jam finiĝis; kavaliroj malaperis. Sed se amata junulino diros al vi: "Jen tiu ringo estas mi!", kaj ĵetos ĝin en flamon de plej granda incendio, ekzemple incendio de Fejgina muelejo (kiel delonge tio okazis!), – ĉu vi ne ĵetos vin por savi la ringon? "Ho, kia vi estas stranga! Certe ne!" – vi respondas. – "Mi vizitos vendejon, kaj aĉetos por ŝi novan dekofoje pli multekostan ringon."; kaj ĉu ŝi diros, ke ŝi jam ne estas tiu ringo, sed nun ŝi estas multekosta ringo? Mi neniam kredos tion. Cetere, mi apartenas ne al via kahorto, leganto. Povas esti, ke tiu virino, kiu plaĉas al vi, tiel faros. Vi, verŝajne, estas posedanto de multaj akcioj, kaj povas esti eĉ ano de "Greger kaj Ko". Vi eĉ en Bukareŝt-on abonas revuon "La libelo" por amuzi vin. Ĉu povas esti vi memoras kiel en infanaĝo vi havis ŝancon observi papilion, kiu, fluganta al lumo, trafis en fajron? Vi tiam ankaŭ amuziĝis. La papilio baraktis, kuŝante sur la dorso, kaj svingis kurtajn bruldifektajn flugilojn. Vi trovis tion interesa; poste la papilio tedis al vi, kaj vi per fingre premmortigis ĝin. La povra estaĵo finis suferi. Ho, favora leganto! Se vi povus per fingre premmortigi min por ke ankaŭ mi finu suferi! Ŝi estis stranga junulino. Kiam komenciĝis milito,

ŝi dum kelkaj tagoj vagadis morna, silentema, kaj mi per nenio sukcesis amuzigi ŝin.

– Aŭskultu, – iufoje ŝi diris al mi: – ĉu vi estas honestulo?

– Verŝajne jes, – mi respondis.

– Honestaj homoj per realaj aferoj konfirmas siajn vortojn. Vi voĉdonis por milito: vi fariĝu militisto.

Ŝi kuntiris la brovojn, kaj forte premis mian manon per sia maneto.

Mi rigardis Maŝa-n, kaj serioze diris al ŝi:

– Jes!

– Kiam vi revenos, mi iĝos via edzino, – ŝi diris al mi sur albordiĝejo. –

Revenu!

Larmoj sufokis min, mi preskaŭ ekploregis. Sed mi estis firma, kaj trovis fortojn por respondi al Maŝa:

– Memoru, Maŝa, ke honestaj homoj... – per realaj aferoj konfirmas siajn vortojn, – ŝi finis la frazon.

Mi lastfoje alpremris ŝin al mia koro, kaj tuj envagoniĝis.

Mi iris militbatali pro Maŝa, sed mi honeste plenumis mian militistan devon ankaŭ rilate al la patrolando. Mi vigle paŝis tra Rumanio sub pluvo kaj polvo, dum varmego kaj frostoj. Mi abnegacie rongiŝis biskotojn de "milita kompanio". Kiam en batalo mi unufoje renkontiĝis kun turkaj militistoj, mi ne ektimis: pro tio oni ornamis min per Ferkrucito, kaj promociis min suboficiro. Dum dua renkontiĝo kun turkoj, io laŭte krakis, kaj mi falis surteren. Ĝemado, vualo en la okuloj... Kuracisto en blanka antaŭtuko, kun sangomakulitaj manoj... Flegistinoj... Mia detranĉita kruro kun nevuso... Ĉio ĉi kiel sonĝo preterflugis min. Sanitara trajno kun komfortaj litoj, kaj eleganta komisiita sinjorino, rapide moviĝas en Sankt-Peterburĝon.

Kiam vi lasas urbon, kiel konvenas al la homo, dukrura, sed revenas en ĝin sur unu kruro kaj protezo anstataŭ la alia – tio signifas multon, kredu al mi.

Mi trafis en hospitalon; tio okazis en julio. Mi petis trovi en adresinformejo adreson de Maria Ivanovna G., kaj bonanima gardist-soldato alportis ĝin al mi. La adreso restis sama – strato Galernaja... Mi skribas leteron unuan, duan, trian, sed ne ricevas respondon.

Mia kara leganto, mi jam rakontis al vi ĉion. Vi, certe, ne ekkredis al mi. Ankaŭ la historio estas neordinara: ia kavaliro kaj ia insida perfidulino. "Ĝuste kiel antikva romano!". Mia sagaca leganto, vi vane ne kredis al mi. Ekzistas tiaj kavaliroj ankaŭ krom mi...

Finfine oni faris por mi lignan protezon, kaj mi mem povis ekscii kial Maŝa silentis. Per fiakristo mi trafis straton Galernaja, poste per malfirmaj paŝoj lante supreniĝis laŭ longa ŝtuparo. Ho, kiel mi facile supreniĝis laŭ ĝi antaŭ ok monatoj! Finfine jen estas la pordo. Mi sonorigas pordosonorilon kun kortremo... Malantaŭ la pordo aŭdiĝas paŝoj. Maljuna ĉambristino Avdotija malfermas la pordon, kaj mi, ne aŭskultante ŝiajn gajajn ekkriojn, kuras (se nur eblas kuri per diverslongaj kruroj) en gastejon. Maŝa!

Ŝi ne estas sola: ŝi sidas kun sia malproksima parenco, tre bona junulo, kiu nun finas kurson en universitato, kaj en perspektivo esperas ricevi tre bonan oficon. Ili ambaŭ tre ĝentile (verŝajne pro mia ligna protezo) salutis min, sed ambaŭ konfuziĝis. Post kvaronhoro mi komprenis ĉion.

Mi ne volis malhelpi al ilia feliĉo. Sagaca leganto moke ridetas: ĉu vi volas ke mi kredu al ĉiuj-ĉi dubindaj rakontoj? Kiu facile fordonos sian amatinon al ia bubo?

Unue, li tute ne estas bubo, kaj due... Mi, verŝajne, dirus al vi kio estis due... sed vi ne komprenos... Vi ne komprenos ĉar vi ne kredas, ke en nia tempo ankoraŭ ekzistas bono kaj vero. Vi preferus malfeliĉon de tri homoj ol vian malfeliĉon. Vi ne kredas al mi, sagaca leganto. Nu, ne kredu; Dio estu kun vi!

Post tri tagoj okazis edziĝofesto; mi estis fianĉamiko. Mi fiere plenumis miajn devojn dum la ceremonio, kie mia plej altvalora junulino fordonis sin al aliulo. Iufoje Maŝa senkuraĝe ekrigardis al mi, kaj ŝia edzo konfuzo kaj atente ekparolis min. Gaja etoso regis dum la edziĝofesto. Oni drinkis ĉampanon. Germanoj-parencoj kriis "hoch!" [hura!(germ.)] kaj nomis min "der russische Held" [Rusa heroo (germ.)]. Maŝa kaj ŝia edzo estis luteranoj.

"Aha!, – kriegas sagaca leganto, – jen vi kaptiĝis, sinjoro heroo! Por kio al vi necesis luterana konfeso? Nur por tio, ke en decembro oni ne geedzigas ortodoksulojn! Jen estas ĉio. Kaj viaj dubindaj rakontoj estas pura elpensajo".

Opiniu, kion vi volas, sagaca leganto. Por mi tute egalas. Sed se vi kun mi vagadus dum la decembraj noktoj laŭ la Palaca kajo, kun mi aŭskultus ŝtormojn kaj turhorloĝon, frapado de mia ligna protezo; se vi sentus kio okazas en mia animo dum la vintraj noktoj, vi ekkredus... "Ging...gang... giling...gilang!" – la turhorloĝo signas la kvaran horon. Necesas reveni hejmen, ĵeti sin en solecan malvarman liton, kaj ekdormi. Ĝis revido, leganto!

1878 г.

*Elrusigis Gennadij Šlepĉenko (Vladivostoko)*



## Tradukoj el Esperanto al la rusa

Ni prezentas tradukojn de la poemo de Oleg Ĉajka (Moskvo) fare de du komencantaj esperantistoj el Maĥaĉkalaŭ.

Oleg Ĉajka

Blua nebulo arbaron  
brakligas,  
Dronas en ĝi ĉiu son'.  
Mia paŭado foliojn  
flugigas:  
Venis malgaja sezon'.  
Arboj nuditaj staras  
silente  
Branĉojn klinante al ter'.  
Suno foriras al  
okcidento,  
Restas nur mi kaj vesper'.  
Kion mi faros? – sola mi  
vagas,  
Bunta susuras kovril'.  
En sonĝa vualo naturo  
imagas  
Kiel alvenos april'.

*Oleg Ĉajka*

Сизым туманом  
окутана роцца,  
Всякие звуки во мгле  
Тонут. Лишь палые  
листья полощет  
Шаг мой. Деревья к  
земле  
Ветви склонили.  
Уходит светило  
За горизонт: меркнет  
свет.  
Грусти пора подступает  
уныло.  
С вечером я tête-à-tête,  
Быть как не зная,  
брожу одиноко.  
Грёзы природы как  
трель  
В шорох шагов  
пробиваются робко:  
«Ждём, что вернётся  
апрель!»

*Rusigis Abutrab  
Aliverdiev*

Вновь небо синее лес  
обнимает,  
Каждый в нём звук  
затаён.  
И от шагов моих листья  
взлетают:  
Близится грустный  
сезон.  
Тихих дерев полуголые  
лапы  
Мягко притянет земля.  
Медленно солнце  
уходит на запад.  
Вечер остался и я.  
Как же мне быть?  
Одиноко плутаю,  
Листьев шуршит  
акварель.  
В сонной вуали  
природа мечтает,  
Чтобы вернулась апрель.

*Rusigis Lubov  
Ostrevnaja*



## La unua porinfana lernolibro reeldonita



Ĉi printempe al REU turnis sin s-ro Nikolaj Aleksejeviĉ Parusnikov, profesoro pri matematiko el Moskva Ŝtata Universitato. En infaneco li lernis Esperanton ĉe Varvara Nikolajevna Seriševa, fratino de la fama esperantisto Innokentij Serišev. Varvara Nikolajevna laboris en la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento en Altajo.

Ŝi mem inventis lernolibron por infanoj kun propraj ĉarmaj desegnaĵoj. La lernilo estis manfarita en 20 ekz., 1 ekzemplero trafis Italion, kie ĝi estis eldonita en 1925 jaro.

Nikolaj Aleksejeviĉ ekhavis ideon reeldoni la lernilon memore al sia instruistino. Ni ekis

serĉi la raran libron.

Feliĉe helpe de Irina Gonĉarova ĝi estis trovita en Germanio, sendita Moskven kaj N. A. Parusnikov propra-koste sukcesis reeldonigi ĝin. Ĝi aperis belaspekte en la privata eldonejo "Granit" en Moskvo.

N. A. Parusnikov nun estas 92-jara, bedaŭrinde blinda, sed plenentuziasma kaj laborkapabla. Li ŝatus, ke la lernilo trafu al homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto. Ankaŭ memoro pri V. N. Seriševa restu dank' al ŝia sindona laboro.

La libron eblas akiri en ajna kvanto ĉe mi: [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)

*Svetlana Smetanina*

## Ludmila Ulickaja en Esperanto

Eldonejo ARS-LIBRI eldonis libron de Ludmila Ulickaja "Daniel Stein, interpretanto" en esperanta traduko de Tomasz Cmelik. Provlegis (fakte, draste redaktis kaj multon retradukis) mi.

La romano estas verkita en formo de leteroj de tre diversaj personoj. Tio donas vastan bildon de la homoj el diversaj nacioj kaj diversaj landoj antaŭ, dum kaj post la 2-a mondmilito. Rolas judoj, poloj, belorusoj, rusoj ka., kiuj apartenis al diversaj konfesioj kaj konduktantaj konforme al tio. Kruleco de la epoko estas vive kaj reliefe montrata, sed ankaŭ la interhomaj varmaj rilatoj, traktataj de la



protafonisto kaj, implice, de la aŭtoro, kiel la vera kristana amo. Ĉio faras la verkon unu el la plej elstaraj rusaj romanoj de la nuna jarcento, kiun varme akceptis kaj la legantoj (krom ekleziaj agantoj kaj religiaj fanatikuloj), kaj la kritikistoj – en 2007 la libro estis distingita per la nacia premio “Granda libro”.

La romano baziĝas sur la reala biografio de Daniel (ĉe naskiĝo – Shmuel Oswald) Rufeisen, kaj granda parto de epizodoj estas veraj epizodoj el lia vivo. Ne nur lia agado dum la milito, kiam li sukcesis savi de mortigo ĉ. 300 judojn el la getto de la urbo Mir, ne nur skandalo, kiu okazis en 1950-aj, kiam oni rifuzis doni al li la israelan civitanecon, ĉar li fariĝis kristano, sed ankaŭ liaj renkontiĝoj kun Karol Józef Wojtyła/Roma papo Johano Paŭlo la 2-a. Cetere, pri ili mi opiniis, ke tio estas fantazio de la aŭtoro, sed s-ino Ulickaja rakontis al mi, ke mi eraras, kaj Rufeisen mem al

ŝi tion rakontis. Do, realeco de la romano estas eĉ pli granda, ol mi supozis, kiam ĝin legis kaj laŭlinie esploris, redaktante la tradukon!

Apero de la traduko el nuntempa rusa klasikulo estas ĝojiga evento. La eldono aspektas lukse: bela malmola kovrilo, luksa papero, eĉ snura legosigno! Bedaŭrinde, la prezo de la libro en la katalogo de UEA estas, tial, tre granda – 45 eŭroj. Sed, espereble, la ŝatantoj de bona literaturo, kiuj deziras ĝin akiri, troviĝos!

*Nikolao Gudskov*



**Daniel Rufeisen, la originalo de la protagonisto de la romano Daniel Stein**

**En la katalogo de UEA:**  
**Daniel Stein,**  
**interpretanto.** *Ludmila Ulickaja.*  
 Tradukis T. Chmielik. **Prozo**  
**tradukita / romanoj.** Ars-Libri.  
 Lublin. 2021. 596 paĝoj. Prezo:  
 45.00 €

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9898>



## Krucvortemigmo

Karaj samideanoj, mi komencis krei krucenigmojn!

Plejmulton de vortodifinoj mi rekte prenis el PIV 2020 (<https://vortaro.net>). Aliokaze mi vortumis ilin surbaze de tiu vortaro. Mi mallongigis difinon, se ĝi estas tro evidenta, por ke ne estu al vi tro facile: neinterese! Aŭ mi prezentis nur unu difinon, se la vorto havas kelkajn. Nur malofte mi faris tute alimaniere...


Mi strebis ne uzi tro nekonatajn vortojn: laŭeble ne uzi vortojn, kiujn mi mem vidas unuafoje. ☺

Malsame kiel oni kutime faras en krucenigmoj mi foje uzis ne nur substantivojn, sed, kiam tio aspektas pli nature, ankaŭ aliajn vortospecojn: adjektivojn, verbojn, adverbojn.

Ofte mi uzis ne la tutan vorton, sed nur ĝian radikon. Mi indikis tion fine de la difino parenteze: (*radiko*).

Bonan cerbumadon!

*Mikaelo Povorin*



### Vertikale:

1. Akordo, formita de du voĉoj, aŭdigantaj samtempe unu saman tonon.
2. Organizita taĉmento da laboristoj, kune laborantaj sub unu ĉefo.
3. 1) Rozosimila ses-koralulo; 2) kemia elemento.
5. Ludo inter du personoj.
6. Virino, destinita profeti kaj ne esti kredata.
9. Flosanta ilo alfiksita ĉe la fundo.
12. Proza verko, ĝenerale nelonga, libere esprimanta la pensojn de la aŭtoro.
13. Antikva kordinstrumento kun ses kordoj frotataj kaj sep ŝoveblaj fretoj.
14. Ekstrakvalita kafo kaj/aŭ infuzajo el ĝi.
15. Interna parto de ŝipo, destinita por ricevi la kargon.

### Horizontale:

4. Sporta, vent- kaj pluv-imuna jako kun kapuĉo.
7. 1) Esenca kaj kerna ideo; 2) valoro, graveco.
8. Hebrea tribunalo.
10. Frakcio kun numeratoro egala al unu.
11. Fabela estaĵo de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj.
16. Speciala skribo, konsistanta el difinitaj aranĝoj de elstaraj punktoj.
17. Plenumo de ies volo aŭ ordono.
18. Ĉefurbo de regno en Afriko.

*(Respondoj en la sekva numero)*

## **Nigra kvadrato\***

(fabelo)

*Nikolao Neĉavev (Irkutsko)*

En subteretaĝo vivas kato. De tempo al tempo mi donis al li fiŝon. Iufoje mi decidis klerigi tiun beston. Mi demandis lin:

– Kion vi pensas pri "Nigra kvadrato" de Maleviĉ?

Li demandis min:

– Ĉu tio estas viando?

– Ne, tio estas artaĵo!

– Ho, bone. Tiam vi mem manĝu vian "Nigran kvadraton" de Maleviĉ, sed al mi donu blankan kvadraton de lardo kaj ruĝan kvadraton de kolbaso.

– Ho, ve! Mi rakontas al la kato pri arto, sed li pensas nur pri lardo kaj kolbaso.

Tiu kato estas malklera, vulgara, sed li ne solas. En la mondo estas aliaj katoj. Ĉe mia pordo mi renkontis rufan katon Suneton. Mi demandis lin:

– Kion vi pensas pri "Nigra kvadrato" de Maleviĉ?"

– Vi eraras! Per la kapo mi ne pensas, per la kapo mi manĝas.

Mi kuris al la hejmo. Tie mi prenis fiŝon kaj donis ĝin al la kato. La kato formanĝis tiun fiŝon. Poste sidante sur benko kaj ĝuante sunon li aŭskultis prelegon pri "Nigra kvadrato" de Maleviĉ.

Pasis semajno. En najbara korto vivas blanka kato Neĝero. Matene li kuras al mia hejmo. Lin haltigas hundo Trezoro:


– Neĝero, kien vi kuras?

– Mi kuras al prelego pri "Nigra kvadrato" de Maleviĉ.

– Ĉu tiu prelego estas interesa?

– Tiu prelego estas enua, sed ĝi tre bongustas.

\* En konkurso de EKRA (Branĉo humuro) la fabelo gajnis la unuan premion



## REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ 2021

La 19-an de septembro la Komisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK) diskonigis la rezultojn de la 72-a okazigo en premifesto elsendita pere de la kanalo de UEA ĉe YouTube, UEA viva. La BK-feston kungvidis Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) kaj Miguel Fernández, respektive Sekretario kaj Prezidanto de la Belartaj Konkursoj. En la BK partoprenis absolute rekorda nombro de **186 verkoj** el la 5 kontinentoj.

Miguel Fernández anoncis la aperon de la libro *Ĉiuj steloj etas nokte* ([katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9877](http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9877)), antologio de mikronoveloj partoprenintaj en la Belartaj Konkursoj. Krome li deklamis la poemon *Soneto de la Lumturo*, de Suso Moinhos, el la libro *Laminarioj*. La poemon *Fratinoj*, de Kris Williams (Ungar) deklamis Sara Spanò. La BK-feston ornamis 3 kantoj: *Ekas la nokto*, kies teksto ricevis la unuan premion en la branĉo Kantoteksto, kaj estis muzikigita de Liven Dek kaj orkestrita de Antero Ávila; *Bela rev'*, kies teksto ricevis honoran mencion en la branĉo Kantoteksto kaj estis muzikigita de Kajto; kaj *Venu al la kisoj*, de Miguel Fernández kaj Viktoro Solé. La videon fermis fota prezento de pluraj el la aŭtoroj de la mikronoveloj konsistigantaj la kolekton *Ĉiuj steloj etas nokte*.

La Premia Festo de la Belartaj Konkursoj de UEA 2021 re-spekteblas en UEA viva: [youtu.be/NE1Ye1eh6o4](https://youtu.be/NE1Ye1eh6o4).

Jen la premioj aljuĝitaj:

### BRANĈO POEZIO

Juĝkomisiono: Krys Williams, István Ertl, Mao Zifu.

Partoprenis 67 verkoj de 36 aŭtoroj el 23 landoj [1 el Oceanio, 6 el Azio, 1 el Afriko, 3 el Ameriko, 12 el Eŭropo]

La unua premio estas aljuĝita al “Koren de mallumo” de Miĥail Frolov el Rusio.

La dua premio estas aljuĝita al “Ĉe via cindro” de Benoît Philippe el Germanio.

La tria premio estas aljuĝita al “Ĉe la martkomenco” de Choe Taesok el Sud-Koreio.

Honora mencio estas aljuĝita al “La sonĝo” de Evgenij Georgiev el Kazahio.

### BRANĈO PROZO

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele

Partoprenis 38 verkoj de 25 aŭtoroj el 17 landoj [4 el Azio, 3 el Ameriko, 10 el Eŭropo].

La unua premio estas aljuĝita al “Mi trinkas vino” de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

La dua premio estas aljuĝita al “Parade antaŭ la reĝo” de Anna Lowenstein el Britio.

La tria premio estas aljuĝita al “Kredi” de Sara Spanò el Italio.

### SUBBRANĈO MIKRONOVELO

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele.

Partoprenis 45 verkoj de 27 aŭtoroj el 16 landoj [1 el Oceanio, 4 el Azio, 3 el Ameriko, 8 el Eŭropo].

La unua premio – premio Paula Adúriz – estas aljuĝita al “Mia sozio” de Jorge Rafael Nogueras el Usono.

### **BRANĈO TEATRAĴO**

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Saša Pilipovic, Georgo Handzlik  
Partoprenis 1 verkoj de 1 aŭtoroj el 1 lando [el Azio].

La ĵurio aljuĝis neniun premion.

### **SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO**

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Saša Pilipovic, Georgo Handzlik  
Partoprenis 4 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj [1 el Azio, 1 el Eŭropo].

La ununura premio – premio María Cuevas – estas ne aljuĝita.

### **INFANLIBRO DE LA JARO**

Juĝkomisiono: Edmund Grimley Evans, Ricardo Albert Reyna, Jang Jeong-Ryeol.  
Partoprenis 6 infanlibroj de 4 eldonejoj el 4 landoj [el Eŭropo].

La premio estas aljuĝita al la Eldonejo Dokumenta E-Centro pro la verko “La aventuroj de Jombor kaj Miki”.

### **BRANĈO ESEO**

Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.  
Partoprenis 8 verkoj de 6 aŭtoroj el 6 landoj [2 el Azio, 4 el Eŭropo].

La unua premio – premio Luigi Minnaja – estas ne aljuĝita.

La dua premio estas aljuĝita al “Por ke ĉiu komprenu ĉiun” de Aleksandro Melnikov el Rusio.

La tria premio estas ne aljuĝita.

Honora mencio estas aljuĝita al “Tridek malmortoj de Danielo” de Roman Dobrzyński el Pollando.

### **BRANĈO KANTOTEKSTO**

Juĝkomisiono: Ĵak Le Puil, Ankie van der Meer, Flavio Fonseca  
Partoprenis 19 verkoj de 12 aŭtoroj el 11 landoj [8 el Azio, 1 el Ameriko, 10 el Eŭropo].

La unua premio estas aljuĝita al “Ekas la nokto” de Antonio Valén el Hispanio.

La dua premio estas aljuĝita al “Kanto trista” de Richard Hable el Aŭstrio.

La tria premio estas aljuĝita al “Robinson” de Petro Palivoda el Ukrainio.

Honora mencio estas aljuĝita al “Bela rev’ ” de Ewa Grochowska el Francio.

Honora mencio estas aljuĝita al “La balado de l’ kukolo” de Sergo Sire el Francio.

La Estraro de UEA elkore gratulas ĉiujn partoprenintojn, speciale la premiitojn, kaj profunde dankas la gravan laboron de la juĝantoj kaj de la Komisiono.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 980, 2021-09-20*

**Ni gratulas ĉiujn premiitojn!**

**Inter gajnintoj de BA estas kelkaj personoj, kiuj estas niaj samlandanoj, kaj kontribuantoj al nia revuo. Ni speciale gratulas sinjorojn **Mihail Frolov, Evgenij Georgiev** (liaj verkoj troviĝas ankaŭ en tiu ĉi numero) kaj **Aleksandr Melnikov** pro grandaj sukcesoj, kaj deziras novajn atingojn sur la literatura kampo!**

## ALVOKO AL PARTOPRENO EN LA 73-A OKAZIGO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA, EN 2022

Geamikoj, en BK-2021 ni havis problemojn pri la retadreso, al kiu ni petis konkursantojn sendi siajn verkojn. Ial la interreta servilo blokis tiun retadreson, kaj ne eblis malbloki ĝin. Ni ne scias, kiom da konkursaĵoj perdiĝis tiukaŭze. Ni starigis novan ret-adreson kaj petis konkursantojn sendi al ĝi siajn verkojn. En la tago de la limdato, nome en la 31-a de marto, la nombro da konkursaĵoj ricevitaj en la nova retadreso estis nur 70, nombro ege dista disde la 151 kaj 171 verkoj ricevitaj en, respektive, 2020 kaj 2019. Tial ni ampleksigis la datlimon je unu plia monato. El tio rezultis la granda surprizo, ke en tiu monato ni ricevis 116 pliajn verkojn, nome 186 konkursaĵojn entute, rikolton rekordan en la historio de la Belartaj.

La Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA esprimas la grandan ĝojon tiukaŭze spertitan de la gvida BK-skipo kaj instigas beletremulojn eĉ superi tiun rekordon konkursante per altkvalitaj verkoj en ĉi nova okazigo de tiu kultura evento, unu el la jam tradiciaj kaj plej ŝatataj en Esperantujo. Plie, li anoncas, ke la enkonduko de la nova branĉo Kantoteksto, kiu, principe, estis nur provizora, fariĝis definitiva, se konsideri la sukceson, kiun ĝi atingis en sia premiero. Kaj krome, la ĝisnuna subbranĉo Mikronovelo estas konsiderata de nun plenrajta branĉo de la konkurso.

La rezultojn oni anoncas, ĉu ĉeeste, kadre de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo (Kanado), se oni ĝin fine eblos okazigi, ĉu iam, inter julio kaj septembro, kadre de virtuala BK-Festo samspeca kiel la ĉi-jara kaj la pasint-jara. Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

**Poezio:** maksimuma longo ne fiksita.

**Prozo:** maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

**Mikronovelo:** (maksimuma longo 100 vortoj). La unua premio nomiĝas *Premio Paula Adúriz*.

**Teatraĵo:** maksimuma longo ne fiksita.

**Teatraĵo, subbranĉo Monologo (unupersona teatraĵo) aŭ Skeĉo (unu- aŭ divers-persona):** daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. La unua premio nomiĝas *Premio María Cuevas*.

**Eseo:** teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas *Premio Luigi Minnaja*.

**Infanlibro de la Jaro:** originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2021. Aljuĝata estas nur unu premio.

**Kantoteksto:** maksimuma longo ne fiksita.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la **31-a de marto**

**2022.**

Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al *Belartaj Konkursoj de UEA*, ĉe *Miguel Gutiérrez Adúriz*, prefere retpoŝte al unu el jenaj adresoj:

[bk@co.uea.org](mailto:bk@co.uea.org); [belartajkonkursoj@gmail.com](mailto:belartajkonkursoj@gmail.com); aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coteros I-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio*, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anoni! mecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de *Miguel Gutiérrez Adúriz kaj tri ekzemplerojn al Ionel Oneț, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*.

**Premioj:** En la branĉoj *Poezio, Prozo, Teatraĵo kaj Eseo*: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la branĉoj *Mikronovelo kaj Kantoteksto*, kaj en la subbranĉo *Monologo aŭ Skeĉo*: unua premio 100 €, dua premio 25 €, tria premio 25 €. Cetere, la teksto ricevinta la unuan premion en la branĉo *Kantoteksto* estos muzikigita, kaj la rezultita kanto estos diskonigita en ludado fare de kantisto aŭ kantogrupo.

Detala regularo troviĝas en la retejo de UEA. La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2022, legeblas en la volumo *Belarta rikolto 2022*, eldonota de Mondial. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie: [esperanto.net/literaturo/bk/index.html](http://esperanto.net/literaturo/bk/index.html).

*Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 982, 2021-09-22*



---

**CERBE kaj KORE**

*n-ro 21 (89), oktobro 2021*

**Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 121**

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio

**Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta indiko de la fonto**

Ckk atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru).

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

---

Redaktofino 11.10.2021